
PILO-PRESS
Internacia
Informservo



Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

Speciala eldono - 19 feb 1976

# SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

Amikeco inter esperantistoj devus esti memkomprenebla afero. Kaj speciala semajno de internacia amikeco devus esti superflua por esperantistoj. Amikeco devus regi dum la tuta jaro inter esperantistoj. Sed ni scias, ke la realeco ne respondas al la idealo de nia movado. Tion speciale montras lasttempaj aferoj, kiuj maltrankviligas multajn esperantistojn de bona volo.

Estas do nia deziro, ke la "Semajno de Internacia Amikeco" 1976 ( 23-a ĝis 29-a de februaro) kontribuu ke denove regu vera amikeco inter esperantistoj.

*****************

Ĉi-okaze ni memoru ankaŭ la iniciatinton de la Semajno de Internacia Amikeco, s-ro Erik Carlén, direktoro de Ytong-entreprenoj en Svedio, kiu fariĝis 70-jara la 15-an de januaro 1976. Al li ni direktas bondezirojn kaj salutojn okaze de la Semajno de Internacia Amikeco (SIA) 1976.

++++++++++++++++

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco

PILO-PRESS

salutas ĉiujn legantojn, abonantojn, kunlaborantojn kaj amikojn ĉie en la mondo!
Specialan saluton ĝi direktas al la Redakcio de la pola gazeto

ILUSTROWANY KURIER POLSKI

kiu regule publikigas en pola lingvo informojn pri aŭ el Pilo-Press

**DOROBEK ESPERANCKIEGO „PILO-PRESS"**

Esperancka Agencja Informacyjna „Pilo-Press", redagowana w Norymberdze (RFN), mogła przedstawić w swoim rocznym raporcie nie tylko bogaty dorobek informacyjny, ale i ogrom wydawnictw wychodzących w tej agencji. „Pilo-Press" jest bowiem także wydawcą czasopisma „Europa Esperanto-Revuo" (Europejski Przegląd Esperancki) oraz pisma informacyjnego o esperancie, ukazującego się w języku niemieckim. „Pilo-Press" prowadzi także księgarnię i wysyłkę książek, podręczników i słowników esperanckich.

„Pilo-Press" jest najpoważniejszą agencją informacyjną. W swoich tygodniowych biuletynach prasowych szczególnie szeroko uwzględnia sprawy polskiego ruchu esperanckiego, zwłaszcza rozgłośni esperanckiej Polskiego Radia.

Ilustrowany Kurier Polski 12.2.1976

Informo pri Pilo-Press, Eŭropa Esperanto-Revuo

Salutoj okaze de SIA 1976

Okaze de la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO (SIA) 1976 salutas kaj petas kunlabori obstine kaj pacience por kaj per Esperanto:

1) Christliche Esperanto-Gruppe, KELI-Stuttgart
Gundelsheimer Str. 16 (Niegisch)
D-7000 Stuttgart 40 Rot, F.R. Germanujo

2) Jakob Ratzinger kaj edzino (Naturamikoj Esperanto)
Rotweg 146, D-7000 Stuttgart 40 Rot, F.R. Germanujo

3) Familio Peter kaj Monika Klimpke (KELI Stuttgart)
Waldstr. 40, D-7022 Leinfelden-Oberaichen, F.R. Germanujo

4) Alfred Niegisch (KELI Esperanto)
Gunde..heimer Str. 16, D-7000 Stuttgart 40 Rot, F.R. Germanujo

5) Esperanto-Societo Mannheim-Ludwigshafen
Osterroderweg 4, D-6800 Mannheim 33, F.R. Germanujo

6) Esperanto-Grupo Nürnberg
Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, F.R. Germanujo

7) Eŭropa Esperanto-Revuo, Redakcio kaj Eldonejo
Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, F.R. Germanujo


8) Esperanto, kiel la muziko, konas neniajn limojn
Bertil Englund
Sigmundgraben 53, D-8670 Hof, F.R. Germanujo

9) Esperanto-Centro Paderborn
kun ĉiuj siaj ĉefprofesiaj kaj volontulaj kunlaborantoj elkore salutas vin!
Hermann Behrmann, Dragutin Smolić, Jim Cushing, Spomenka Ŝtimec, Karl Trimborn, Karl Linke (Kalinke), Mario Fiorelli, Resi Meilwes, Benno Klehr

10) Gunda Hofmann, Anny Hartwig, Ottilie Schmitt
kunlaborantinoj de Esperanto Nürnberg

11) Esperanto-Grupo Fürth
Damaschkestr. 20, D-8510 Fürth/B. F.R. Germanujo

12) Petro Poliŝĉuk, Prezidanto de la Esperanto-Komisiono kaj Membro de la Prezidantaro de Uzbeka Amikeca Asocio
Novo-Moskovskaja 18, kv.15, Taŝkent 52, Uzbekistan, U.S.S.R.




Salutkarton de la 2-a Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio ricevis la eldonanto de Pilo-Press. Ludwig Pickel, kiu pludonas la salutojn al la legantoj de Pilo-Press.
Sur la salutkarto oni trovas i.a. la subskribojn de s-roj Vitek kaj Koĉvara (ĈEA), Rudi Graetz kaj Detlev Blanke (CLE de GDR)

**************

<u>Pilo-Press salutas</u>
la <u>Esperanto-Redakciojn</u> de

Radio Varsovio, Radio Vieno (ORF), Radio Roma, Radio Zagreb, Svisa Kurtonda Servo, Radio Sofio, Radio Pekino kaj ĉiujn aliajn radiostaciojn, kiuj elsendas Esperantoprogramojn kaj <u>deziras</u> abundon da korespondaĵoj dum 1976!

++++++++++++++

<u>Pilo-Press</u> internacia informservo

aperas ĉiusemajne kun aktualaj informoj kaj raportoj pri la Esperanto-vivo. Speciale ĝi informas pri la Esperanto-elsendoj de radiostacioj.

<u>La jara abonkotizo estas 30,- GM</u>

Abonu ĉe Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, FRG
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

## Eŭropa Esperanto-Revuo Jarkolekto 1975

### Kompletaj jarkolektoj haveblaj

Nürnberg (pp) - La unua jarkolekto de Eŭropa Esperanto-Revuo nun estas kompleta. Ok numeroj sur 96 paĝoj grandformataj - DIN A 4 - prezentas varian interesan enhavon kun multaj fotoj.

Eŭropa Esperanto-Revuo havas konstantajn rubrikojn: Eŭropa Panoramo - El la Germana Esperanto-Movado - Pozitive Junulara Bulteno - Literaturo - Kulturo.

El la enhavo de la jarkolekto 1975:

Ĝeneralaj temoj

Prof. D-ro Helmar Frank, Lingvopolitiko por Eŭropo
Eŭropa kooperad-projekto, Pedagogiko-Interlingvistiko-Kibernetiko
La lingva situacio en Eŭropo, Kolokvio en la Eŭropa Akademio Otzenhausen

Primovadaj temoj

Prof. D-ro Humphrey Tonkin, Pri la celo de la Esperanto-Movado (El la malferma parolado de la 60-a UK en Kopenhago)
Intervjuo kun Humphrey Tonkin
Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, Mesaĝo por 1976
D-ro Renato Corsetti, Pri regiona agado
Peter G. Forster, La ideologio de Esperanto kaj la koncepto de superŝtato

Prilingvaj temoj

Georg Chr. Sack, Sonpentrado en Esperanto
Hugo Greff, Al Toronto -ideologikritiko
Karlheinz Schwartz, Infanoj en Toronto -provo de apreco

El Pozitive - junulara bulteno

Guido Brandenburg, GEJ-junuloj en Pollando
Ulrich Brandenburg, La rolo de lingvo kaj kulturo en politika subpremado, raporto pri seminario en Portugalujo

Kulturaj temoj - Literaturaj kontribuaĵoj

Thomas Morawa, Japanio - vidita de interne, impresoj kaj iluminacioj dum vojaĝo al kaj en la Lando de Sun-Leviĝo
D-ro A. Baur, Pri la svisgermana kaj malaltgermana lingvoj
Pola Esperanto-Teatro
Hans Jakob Christoffel von Grimmelshausen, La aventuroj de Simplicius Simplicissimus (4 ĉapitroj)
Ephraim Kishon, 5 satiroj el "Ne tiel laŭte antaŭ Jeriĥo"
Kie troviĝas Tuval?
Eĉ lavomaŝino estas nur homo
Pri la vivo kun komputeroj
Kiel eldonistoj reklamas
La rusoj venas (Tradukis Gerhard Ziegler)

Krome la jarkolekto entenas multajn raportojn kaj informojn el la Esperanto-movado kaj kontribuaĵojn pri diversaj temoj.

La enhavo estas interesa kaj aktuala ankoraŭ nun kaj por multaj jaroj; la literaturaj kontribuaĵoj valoras esti legataj de multaj esperantistoj. Aĉetu kaj donacu la kompletan jarkolekton 1975!

Prezo inkl. afranko 12,- DM Mendu ĉe Ludwig Pickel, Postfach 2113 D-8500 Nürnberg 1, Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

La kuranta jarkolekto 1976 estas abonebla kontraŭ 16,-- DM!